

Babilada rondo

okazos vendredon je la 19-a.
la 28-an de septembro

ĉe Monika Golaz

Ecole de Commerce 3 (4403A)
2-a etaĝo - 1004 Laŭzano

la 12-an de oktobro

la 26-an de oktobro

la 9-an de novembro

la 23-an de novembro

la 7-an de decembro

Iru aligi enrete ĉe :

(unuvorte - unulinie)

www.doodle.com/iffkkw7undkzfz8p

Bazara budo

okazos en Laŭzano (La Palud)
sabaton de la 9-a ĝis la 12-a
la 6-an de oktobro

Iru aligi enrete ĉe :

(unuvorte - unulinie)

<http://www.doodle.com/6zcwtq9pp9ayh38r>



Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc

Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14

55 - Kasisto.: Knud Sunier * 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto-Societo

Informilo

Oktobero 2012 - n° 08

**Lunde, la 1-an de oktobro 2012,
je la 20-a**

ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo

Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj

Venu kun viaj malkovraĵoj

Lunde la 5-an de novembro

Decidota

Sabate la 15-an de decembro

Zamenhofa festo

★ ★ ★ 2013 ★ ★ ★

Lunde la 7-an de januaro

Decidota

Lunde la 4-an de februaro

Ĝenerala Asembleo

Lunde la 4-an de marto

Decidota



Ni estis 8 laŭzananoj, kiuj partoprenis la italan kongreson en Mazara del Valo (Sicilio). Ĉiu memoris alimaniere la vojaĝon. Ĉi-foje, ni pruntedonas la skribilon al 4 el la partoprenantoj.

Viktoro

La katedralo de Monreale estas konstruita en la 11-a de la normanda reĝo., Wilhelmo la 2-a. Ĝi estas la kulmino de la beleco. 3 stiloj karakterizas tiun mirindan preĝejon. La ekstera parto estas laŭ la normanda stilo, interne la freskoj laŭ la bizanta kaj 6200 m² de mozaikoj laŭ la araba. Oni povas legi sur la muroj la tutan historion de la homaro tra la 2 testamentoj. Super la ĉefaltaro sur ora fono la Ĉiopova Kristo benas la vizitantojn. Tiu katedralo estas tre granda, ĝia longo estas 40 m, larĝo estas 20m. La orgeno havas 12.000 fajfilojn. La interno estas bele konstruita kun granda artista emo kaj manlaboro, kio blindigas la vizitantojn. Mi rigardis tiun ĉefverkon kun granda mirego. La vojaĝo kaj la kongreso estis riĉa je travivaĵoj neforgeseblaj.

Knud

La Itala Esperanto Kongreso estis ankaŭ por mi la okazo por malkovri Sicilion. Do mi jen estas kunulo de ĝoja teamo por vojaĝo organizata kaj kondukita de François kun granda verovo.

Aldonita je la plezuro de la malkovro de tiu insulo historio plena, mi ankaŭ memortenas la amikecan ligan kiu fortiĝis dum tiu vojaĝo kaj tiu restado. Mi konservas tre belan memoron pri tiu periodo.

Marie-Antoinette

Mia unua partopreno al Esperanto Kongreso estis vere bona sperto. La vojaĝo perfektite organizata de François, la buso kondukita per virtuozece donis al mi tre agrablan sendependon por viziti pejzaĝojn kaj monumentojn.

Ankaŭ ni havis plezuron renkonti la familion de Rosario. Ili gastigis nin tutkore por partigi dolĉaĵojn.

Dum la kongreso, la fakto ke ni povis paroli nur unu lingvon kun iu ajn el 35 reprezentitaj nacioj donis al mi senton de komplaceco kaj frateco. La muzikistoj kajto alportis ĝojan kaj mirindan etoson tra la kursoj kaj la ĥoro ĉiuj tagoj kaj liaj koncertoj. Bela humoro regis dum tuta tempo de la vojaĝo kaj la kongreso.

Karlota

Kolymbetra, dimanĉe la 26-an de aŭgusto 2012

Laŭ la antikva-greka lingvo tiu vorto signifas « naĝejo ». Tiu ĝardeno situas en Sicilio en la Valo de la Temploj. Inter tiu de Vulkano kaj tiu de Kastoro kaj Polukso estas konkego. La militkaptitoj el Kartago fosis 5 hektarojn por fari fiŝbasenon. La akvosistemo kaj kanalaro estis tiel bone konstruitaj ke ĉiam estis sufiĉe da bona akvo por bredi plurajn sortojn da bonaj fiŝoj. En la ĉirkaŭaĵoj estis mirinda ĝardeno en kiu kreskis multe da fruktaroj kiel oliv', fig', oranĝ', mandarin', citronarboj, Ekzotikaj birdoj kantis en la branĉoj kaj mirindaj floroj ĝojigis la okulojn de la vilaĝanoj.

Dum jarcentoj tiu mirinda loko forgesiĝis. Antaŭ kelkaj jaroj oni redonis tiun lokon al la lumo. Tiu ĝardeno estas vera juvelo kaj ricevis premion nomitan la plej bela parko de Italio. en 2012.

Vi povas demandi vin, kial mi rakontas al vi tiun historieton? La partoprenantoj de la itala kongreso konas la respondon. Ni projektis kaj antaŭĝojis viziti tiun lokon. Imagu, ke post horoj da serĉadoj, demandoj, telefonalkvokoj, ni neniam trovis la enirejon de tiu dioj benata loko. Eble ni ne plaĉas al dioj. Tamen ni bone ridis kaj konservas bonan memoraĵon de tiu disreviĝo.